

# Tagiĝo

N-ro 41	Bulteno de Esperanto-Junularo en regiono Ostrava, Ĉeĥoslovakio. - Redaktas: Inĝ. Jan Werner, OSTRAVA-Kunčice, Na Lachu 6	SEPTEMBR 1958
------------	--	------------------

## SKIZE PRI SOMERAJ ESPERANTO-TENDAROJ EN ĈSR.

Someraj monatoj jam pasis, komenciĝas nova sezono en Esperanto-grupoj. Malfermiĝas novaj kursoj, tie-kaj-tie fondiĝas nova grupo, estas planataj plej diversaj entreprenoj. Tamen ankoraŭ ne eblas fermi la aferon pri ĉi-jaraj SET, per kiuj kulminis nia laborjaro 1957-58. La preparkomitato nun enketas kaj kolektas ĉiun utilan materialon, kiu estas prezentota en la fakksido pri SET en Ostrava 28.10.1958 (en kadro de t.n. Interbabilado). Ĉiu tie havos okazon kontribui per siaj propraj rimarkoj kaj sugestoj aŭ povas jam nun anonci ilin skribe al la sekretario Vl. Kočvara (Ostrava VIII, Kamenec 251/3).

La preparkomitato transprenis la funkcion en februaro, sed cirkonstancoj permesis nur en fluo de majo komenci vastan propagandon. En ĉiujn direktojn estis sendataj centoj da flugfolioj kaj invitiloj. Kompare kun la jaroj pasintaj la propagando estis prokrastita je tri semajnoj. Malgraŭ tio ni estis la unuaj, kiuj la kampanjon komencis. Niaj kolegoj organizantaj Esperanto-kolegiojn en Poděbrady, Příbor, Uhorná mutis. Ni komencis dubi pri okazigo de iliaj aranĝoj, kaj prave.

El niaj tendaroj estis en danĝero nur SET Žimrovice. Feliĉe ĝi ne estis afero ekstera, sed tamen ĝi estis kaj estas plu afero pli grava ol ni unuamomente komprenis. Ni volis kunvenigi samideanojn kun bonaj lingvaj scioj el kiom eble plej multaj grupoj, por ke povu efektiviĝi la planita seminario, ia eksterkategoria kurso por funkciuloj de la grupoj kaj kursgvidantoj. Sed ŝajnas al ni, ke preskaŭ ĉiuj grupoj estas tiel fortaj, ke ili ne bezonas konsilojn. En la fiksita termino (15.6.1958) aliĝis nur ok homoj el la tuta Ĉeĥoslovakio, nome: Brno 1, České Budějovice 1, Frýdlant n/O. 2, Karlovy Vary 1, Liberec 1, Olomouc 1, Opava 1. - En la komitato audiĝis voĉoj pri likvido de SET Žimrovice. La situacio estis streĉita. Interŝanĝo de leteroj. Vojaĝoj. Denove kelkaj tagoj pasis. Fina decido sonis jene: Junularo ne likvidos la anoncitan aranĝon!

Tamen estis necesa certa adapto. Anstataŭ la seminario estis envicigitaj lingvaj kursoj A-D, la seminario estis nur je kelkaj temoj en D-kurso. Kontentiga rezulto estis atingita en nova propaganda kampo de nova komitato kaj precipe danke al Draĥ. Kočvara, kiu motocikle vojaĝis tra Ostrava-regiono kaj agitis por SET Žimrovice, kaj danke al s. Fr. Pytloun, kiu post likvido de planita kolegio en Poděbrady rekomendadis niajn tendarojn. La preparkomitato opinias, ke pri la miskompreno rilate la seminarion kulpas precipe la delegitoj kaj ceterej aktivuloj en lokaj grupoj, kiuj ne komprenis gravecon de la seminario kaj neglektis ĉi edukan aranĝon.

Tute mala fenomeno, sed same malagrabla kaj danĝera montriĝis en SET Županovice. Ĝi estis en alia kampanjo plene okupita, la preparoj iris kontentige. Sed imagu surprizon de la tendarestro kaj ankaŭ la nian, kiam anstataŭ 40 homoj venis 60. Sen oferemo kaj agpreteco de s. K. Kraft, gvidanto de la tendaro, tiu dudeko da gesamideanoj, kiuj ne trovis konvena aliĝi, devus reveni hejmen, proprakulpe porti vojaĝelspezojn kaj improvizi sian libertempon. Komprenu, ke aliĝiloj ne estas nia kaprico. En SET estas ĉian lokoj limigitaj! Kaj pro la kaŭzita kaoso poste suferis ĉiuj. La kabano estis plenŝtopita, la kuirejo apenaŭ sufiĉis. Por liberigi unu liton ekzemple la tendarestro veturadis ĉiunokte 17 km motocikle al sia hejmo. Ni postulas vin, vennontjare evitu la moron veni sen aliĝo!

En kazo de SET Lančov ni spertis neoferemon de ni junularo. En Tagiĝo n-ro 38 ni vokis ĉiujn, kiuj povas oferi unu semajnon por konstrulaboroj en tiu ĉi SET, ĉar Junularo Třebíč sentis sin malforta por ĉiuj laboroj. Ni esperis, ke helpos precipe studentoj. Sed niaj esperoj estis naivaj. Aliĝis nur du homoj el Junularo Ostrava, kiu jam zorgis kun Opavanoj pri elkonstruo de SET

Žimrovice. ĈU unusemajna senpaga restado en belega naturo, ĉe ne malfacilaj konstrulaboroj estas tiel naŭza, ke ne eblas "malŝpari" la tempon?

Problemo restas, ĉu niaj tendaroj havas karakteron SET aŭ ISET. Ĉiam ni deziras prepari por la kursanoj internacian medion, por ke lernado de Esperanto estu tuj kompletigata per praktika uzo en internacia rilato. Bedaŭrinde nia klopodo restis preskaŭ senrezulta pro malfavora sinteno de superaj instancoj. Nur hazarde sukcesis veni kelkaj samideanoj el Varsovio kaj vizite por kelkaj tagoj N.I.Nilsson el Svedlando. Sekretario de Junulara Fako de Bulgara Esperantista Asocio s. P. Nikolov venis nur post tendaroj. Ni esperas (ĉu fole?), ke venontan jaron nipos gastigi pli da eksterlandaj samideanoj en Internacia Somera Esperanto-Tendaro, kiel promesis kamaradino Mansfeldová el la ministerio de lernejoj kaj kulturo dum sia vizito en SET Žimrovice.

En organizado de SET aperis ankoraŭ aliaj malfacilaĵoj, sed hodiaŭ ni volas meti antaŭ vin, esperantistan publikon, precipe tiujn faktojn, kiuj vin kulpigas pri senintereso, nedisciplinemo, maloferemo. Ni scias, ke la movadon ne formas nur tiaj unuopulej, ke vi eble sentas vin ofendita. Tamen necesas evidenta organiza kaj idea leviĝo. En pasinteco la junularo ĉiam montris sin agipova. Certe ankaŭ nun junaj esperantistoj deziras esti utilaj batalantoj por disfloro de la enlanda movado laŭ programo de Ĉeĥoslovaka Esperantista Komitato.

Antaŭ fino ni eldiras unu demandon, kiu ŝajne eliĝas tra viaj lipoj: Ĉu SET-58 alportis nur negativajn rezultojn? Nepre ne! Ni ne volas al vi kredigi, ke ĉi-jaraj tendaroj malsukcesis. Ne estas kaŭzo por tia konkludo. En tiu ĉi artikolo ni ne volas doni supervidon pri SET-58, sed kritiki okazintaĵojn, kiujn kaŭzis vi, kontraŭ niaj bonaj intencoj. Kiel menciite, pri SET-58 traktos speciala fakkunsido en Ostrava. Riĉa dokumenta materialo estas preparata. Sed jam nun estas reala la bazo por aserti, ke ni sukcesis.

Unuafoje okazis tri tendaroj kun entute kvar etapoj, unuafoje organize direktis ĉiujn tendarojn unu Centra komitato, unuafoje la nombro de SET-anoj proksimiĝis al 200. La nombro de 14 kursoj enkalkulas po 4 kursoj kaj 2 kursojn de kategorio D. La instruista grupo konsistis el 17 gasamideanoj. Ĝi estas konsiderinda nombro, kvankam kelkaj specialistoj mankis.

D-ekzamenon "pri kapableco instrui Esperanton" faris 7 homoj (kelkaj ekzamenitoj finos la ekzamenon en Ostrava 28.10.): Duba Zabadalová (Praha), Naďa Jirečková (Lanškroun), Miloš Rybín (Partizánska Lúпча), Ĉestmír Závodný (Frýdlant n/0.), Frant. Nymburský (České Budějovice), Dieter Berndt (Žamberk), Jiří Kolečka (Ostrava).

En la jaroj pasintaj ni ofte aŭdis, ke frekventinto de SET organizas novan grupon, ke gvidas kurson, aktivigas laboron de la ceteraj. Certe ankaŭ nunjaraj tendaroj gvidos multajn al serioza laboro celita al vastigo kaj utiligo de Esperanto por paco kaj bono de la homaro. SET-58 ne signifis regreson, sed nepre progreson. Nun estas nia komuna tasko krei kondiĉojn por plua avanco.

J. Werner – Vl. Kočvara

## INTERBABILADO en Ostrava

ZK VŽKG Esperanto-fako invitas vin al tradicia Esperanto-seminario en tagoj 26 - 31 Oktobro 1958. Programo:

En ZK VŽKG "Zámek", Ostrava-Vítkovice, Výstavní 99:

26.10. 19,00 Vl. Novobilský: Laboro de niaj nuntempaj tradukantoj - (kun fragmentaj elmontraj).

En ZK Bytastav en Poruba:

27.10. 9,30 Konferenco pri laboraktivoj en lasta tempo.

13,00 Inĝ. J. Werner: Konstruo de socialismaj urboj. Post la prelego trarigardo de Poruba.

En ZK VŽKG "Zámek":

19,00 ESTRADA VESPERO preparita de la programa grupo de Junularo Ostrava.

28.10. 9,00 Lad. Kyselý: **XXX XXX** de Esperanto

10,00 Fakkunsidoj:

1. Someraj Esperanto-tendaroj (J. Werner).

2. Esperanto en lernejoj (O. Schwetter).

3. Instrumetodoj de Esperanto (D. Kočvara).

- 13,00 Ekzamenoj antaŭ la komisiono (kateg. C,D).
- 29.10. 19,00 Junaj aŭtoroj en konkurso de Tagiĝo  
(Programa grupo de Junularo Ostrava).  
En ZK de minejo Petr Cingr en Ostrava-Michálkovice
- 30.10. 19,00 Vl. Slaný: Pri komencoj de laborista Esperanto movado en ĈSR.  
En Kulturdomo en Ostrava-Hulváky:
- 31.10. 19,00 Drah. Kočvara: Utiligo de Esperanto en pacmovado.

Al ĉiuj, kiuj aliĝos antaŭ la 15 Oktobro 1958 estos prizorgita 50 % fervojrabato.

ADRESO: VI.Kočvara, Ostrava VIII, Kamenec 251/3.

INFORMSERVO: en la ĉefa stacidomo en Ostrava-Prívov,

en kulturĉambro, deĵoros la servo jene:

26.10. - 16,00 - 19,00

27.10. - 7,00 - 12,00

En alia kazo uzu la tramon n-ro 2 ĝis direktorejo de VŽKG kaj aliĝu ĉe pordisto de ZK VŽKV en "Zámek", Výstavní ul. 99 .

D. Kočvara

## *El la vivo de Junularaj grupoj*

Plzeň. 3.9. okazis regiona kunveno de E-junularo ZK ZVIL. S-ano J. Sladký skribas en "Juna esperantisto" n-ro 5: "En tiu ĉi kunveno, kie estos elektita nova regiona delegito por plua laborperiodo, t.e. Lernojaro 1958-59, ni fiksos nian bazan programon kaj metodon de laboro por estonto, por ke ni povu labori ankoraŭ pli bone ..." (La raporto pri la kunveno nin ankoraŭ ne atingis).

Tábor. 22.7. la klubo en Tábor gastigis 12 svisajn gesamideanojn /x/. En la malnova urbodomo salutis ilin oficiale anoj de regionestraro kaj urbestro. Muzea direktoro montris al ili husanajn memorindaĵojn. En la hotelo Slovan estis aranĝita malgranda lunĉo. La karavano daŭrigis la vojaĝon al Písek.

Konsilantaro de Loka Nacia Komitato parolis pri aktiveco de Esperantista Klubo ĉe Kleriga Kunularo en sia 14-a kunsido 4.9.1958. La mencio estis ankaŭ en oficiala invitilo.

Ni ĝojakceptas propagandcele ĉiujn flugfoliajn informilojn (speciale tiujn, kiuj estas eldonitaj de "Místní osvětová beseda"). Adreso: Místní osvětová beseda, Esperantista klubo, Žižkovo nám. TÁBOR.

/x/ La svisaj gesamideanoj, pri kiuj raportis al ni s-anino Lída Komzáková el Tábor, vizitis interalie ankaŭ SET Lančov, kie ili pasigis unu vesperon ĉirkaŭ la bivakfajro. La tendaranoj estis tre ĝojigitaj per la vizito kaj ankaŭ impresoj de la svisaj amikoj estis laŭdire belaj kaj profundaj, eĉ malgraŭ la diboĉa vetero, kiu nin tiuvespere tuŝis per envia duŝo. La kelkhora ĉeesto en SET parte malkaŝis al la gastoj sorĉon de la tendara vivo, en ĉiu karesis senton de travivata aventuro.

Nin ravis belaj kantoj modele prezentitaj de la svisa kanthoro same kiel ilia sincera konduto kaj bonhumoro. Sed tamen okazis kelkaj miskomprenoj. Jes, efektive. Mi ekzemple vidis unu knabon, kiel li ŝvite penas paroli per flua Esperanto kun ĵus veninta fraŭlino. Li laŭeble evitas balbutadon, liaj okuloj entuziasme brilas, ĝojigas lin la reciproka interkompreniĝo, sed fine, anstataŭ triumfo, venas trompo. Li ekscias, ke li parolas kun samideanino el Písek. -Tiel ĉi estis trafita kelkaj tendaranoj, ĉar la svisoj estis akompanataj dum la tuta restado en ĈSR eble de dudeko da ĉeĥaj esperantistoj kaj ĉiuj portis surjake la svisan flageton. Poste dio sci, kiu estas efektiva svislandano.

E-ro

CHRUDIM. La rondeto havas nun 14 membrojn. 11.5. aranĝita ekskurso al Stolany, 18.5. laŭ la rivero Chrudimka ĝis la akvobaro Křižanovice. Ĉeestis 8 anoj.

PARDUBICE. Bedaŭrinde pro teknikaj kaŭzoj (du entreprenoj samtempe) ni nunjare ne aranĝos la renkonton sur Kunětická hora, malgraŭ tio, ke estis ĉio preparita. Mi atentigis, ke ni volas la renkonton ĉiujare aranĝi, en la sama tempo, kaj tamen tiuj, kiuj aranĝas la renkontiĝon en Nové Město n/Met., interkonsentiĝas kun mi.. Jen la modelo, kiel mi ne imagas la kunlaboron.

RD K.Franc

NOVÉ MĚSTO n/Met. 23.-24.8, efektiviĝis en Nové Město regiona esperantista renkontiĝo. En amika kunesto de gesamideanoj el la orientbohemia regiono kaj ankaŭ el Praha, Ostrava k.a. alternis temoj seriozaj kaj bonhumoraj. El la diskutitaj temoj: Listigi ĉiujn prunteblajn Esperantajn librojn en Ĉeĥoslovakio aŭ en la regiono /x/. Unu samideano el Hronov proponis aranĝon de tendaro apud la rivero Metuje, kie eblas uzi ankaŭ kabanajn. Post la kunveno en proksima somera restadejo "Peklo" (Infero) kaj post la tagmanĝo kelkaj ĉeestantoj vizitis Náchod kaj ties kastelon, grupeto de motociklistoj direktis al Ratibořice kaj "Valo de Avinetto".

L. Ĉ.

/x/ "Orientĉeĥa Esperanta Biblioteko" estas 10-paĝa multobligita listo de disponeblaj libroj en bibliotekoj de Esperanto-Klubo en Hradec Králové, Pardubice, Lanškroun kaj de D-ro L.Fousek el Přelouč. Iniciatis ĝin kaj eldonis en aprilo 1952 Junularo Lanškroun. Bedaŭrinde ĝi servis tre limigite, ĉar esperantistoj kutime ne ŝatas legi, almenaŭ ne Esperantajn librojn. Interesuloj pri la listo postulu ĝin de la redaktoro.

J. W.

OPAVA. En Opava okazas kongreso de antropologoj. Sur la domo de Silezia Instituto de Ĉeĥoslovaka Akademio de Sciencoj estas ĉeĥa kaj Esperanta surskribo: "Ni bonvenigas kongreson de antropologoj en Opava." Esperanto estis uzita dank' al D-ro J. Kempny kaj Opava-Esperanto-Junularo.

ORLOVÁ. 4.9.1958 estis tie fondita Esperanto-fako ĉe uzina klubo de la minejo Antonín Zápotocký. La unuan kunvenon vizitis 26 homoj inkluzive de kelkaj gastoj el Ostrava. En kunvenejo estis aranĝita malgranda ekspozicieto. Kiel prezidanto estis elektita s. Josef Juránek. En du kursoj instruos s.VI. Slaný el Ostrava.

Frýdlant n/Ostravici. La loka grupo aranĝis regionan laborkunvenon en restoracio "Městský sad" 17.8. Partoprenis 68 samideanoj, inter ili 85-jara pioniro de E-movado en regiono Ostrava, s. Janečka. La kunveno estis finita per ekskurso sur la monton Ondřejník.

Ostrava-Michálkovice. Esperanto-fako de ZK Petr Cingr preparas solenan jarkurvenon je 21.9.1958. En kulturprogramo partoprenos kelkaj neesperantistaj kolektivoj, nome vira kanthoro, virina trio, orkestro de mandolinistoj. Invititaj estas pluraj lokaj aŭtoritatoj.

Esperanto-Seminario en VSETÍN: 25 - 29 Septembro 1958. La seminario enhavas prelegojn de fruntaj aktivuloj de nia ĉeĥoslovaka E-movado pri temoj lingvaj, literaturaj kaj organizaj. Sabate la 27.9. "Verda Ĉaro de Julio Baghy" el Praha prezentos en teatro "Z" "Legendon pri la amo" de Nazim Hikmet. Dimanĉe la 28-an antaŭtagmeze estos labor-kunveno, posttagmeze aŭtobusa ekskurso al Beskydy.

---

## INTERNACIA RONDO DE ARKITEKTOJ *fondata*

Arkitekturo estas unu el la komponentoj de monda kulturo kaj civilizo. Ĝi estas vere internacia kaj aperas ĉie, kie la homo aperas. Ĝi meritas ricevi internacian akompanon - internaciran lingvon. Celante al tiu ĉi ideo oni proponas unuigi arkitektojn kaj konstrufakulojn de arkitekturo kaj urbanismo en la tuta mondo, kiuj surbaze de komunaj artaj interesoj kaj uzante komunan internaciran lingvon Esperanto kapablas efektiviĝi dezirindan kaj meritindan laboron en ĉi tiu laborkampo. La iniciatan komitaton fondis grupo de zagrebaj arkitektoj. Arkitektoj, aligu ĉe:  
Ark. Tekn. Vlad. Štruceľ, ZAGREB, Krašova ul.br. 27/IV, Jug.

# 44-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

sub honora protektado de la Ministro-Prezidanto de Pola Popola Respubliko  
JÓZEP CYRANKIEWICZ

Varsovio - Pollando

1 - 8 Aŭgusto 1959

En la Kongresa programo troviĝas jenaj ĉefpunktoj:

- I. Manifestacioj antaŭ la kongreso: Oficiala Antaŭkongreso (ĉu em Praha?), Pedagogia Seminario de s-ro Cseh.
- II. Kongresaj laboroj: Kongresaj sekcioj, Ĝeneralaj kunvenoj de UEA, Fakaj kunvenoj, Komitato de UEA, Estraro ĉe UEA, Akademio de Esperanto.
- III. Kulturaj programoj: Solenaĵoj de Zamenhofa Jaro, Belarta Konkurso, Oratora Konkurso, Enlandaj prelegoj, Internacia Ekspozicio.
- IV. Internacia Somera Universitato.
- V. Festoj: Interkonatiĝa Vespero, Solena Inaŭguro, Teatraĵo (aŭ Opero), Kongresa Balo, Specialaj vizitoj, Ekskursoj, Film prezentado, Solena Fermo.

KONGRES-KOTIZOJ	Ĝis 31. XII. 1958			Ĝis 31. III. 1959			post 31. III. 1959		
	Kĉs	zł	\$	Kĉs	zł	\$	Kĉs	zł	\$
KONGRESANO	114.-	144.-	6.-	133.-	168.-	7.-	152.-	192.-	8.-
EDZ(IN)O DE KONGRESANO	57.-	72.-	3.-	66,5	84.-	3,5	76.-	86.-	4.-
JUNUL(IN)O NE PLI OL 20 JARA KAJ STUDENT.	38.-	48.-	2.-	47,5	60.-	2,5	57.-	72.-	3.-

La kongresa kotizo el landoj de rubla zono estas pagata en valuto de la koncerna lando laŭ kurzo rilate al pola zloto, surbaze de indikita kotiztarifo en polaj zlotoj.

STUDENTOJ: La speciala tarifo por studentoj validas nur, se kun la aliĝilo troviĝas atesto de lia/ŝia fakultato. (kotizo: 38,00 Kĉs)

BANKO: Narodowy Bank Polski, Warszawa, VII O.M, nr. 1531-9-525.

POŜTADRESO: 44-a Universala Kongreso de Esperanto, Varsovio, Pollando.

La indikoj estas ĉerpitaj el "Unua Oficiala Bulteno", kie krom la provizora programo, ĝeneralaj informoj kaj la loka Kongresa Komitato estas ankaŭ Unua listo de perantoj, sed peranto por Ĉeĥoslovakio dume ne estas anoncita.

Kontribuaĵojn por la novembra TAGIĜO sendu al red. Ĝis 31.11.

## ĈU "TEJO" kunvenos en Ĉeĥoslovakio?

En ĝenerala laborkunsido de la 14-a Internacia Junulara kunveno 28.7.1958 en Homburg/Saar estis esprimita la prono pri okazigo de la 15-a Internacia Junulara Kunveno en Pollando, Ĉeĥoslovakio aŭ en Aŭstrujo. La 2-a kunsido de la TEJO-komitato formulas sian decidon jene:

"Laŭ propono de Röhnström estas per granda plimulto akceptita la decido, ke la 15-a IJK okazu en Pollando; se tio ne eblas, oni turniĝu unue al Ĉeĥoslovakio, due al Aŭstrujo.

Nunjare mi kelkfoje kontaktis persone kun polaj esperantistoj kaj ni tuŝis ankaŭ la demandon de TEJO-kunveno. Ŝajnas, ke poloj deziras organizi ankaŭ tiun ĉi kunvenon, kiel oni diris, ekzemple en Katowice.

J. W.

NOVE ELEKTITA ESTRARO DE "TEJO":

Prezidanto: Günther Becker, Gasthaus Bürgerhof, Eisenbahn, str. 60, Homburg/Saar (Germ.)  
Vicprezidantoj: Lucien Piétri (Maroko), Richard Reuchlir (Germanio).  
Ĝenerala Sekretario: Nicola Minnaja, Viale Giulio Cesar- 223, Roma. (Italio).  
Kasisto: Adriaan Den Haan, Irenestraat 28a, Leiden (Nederl.)  
Redaktoro: Philippe Honnard, 119 avenue de Choisy. Paris XIII (Francio)  
Estrarano pri kunvenoj: Paul Ciliga (Francio)

### EN LA GRUPO "FAJRE RO".

Volonte ni represas raporton pri la vivo de nia amika grupo en Moskvo. Ni ĝojas el la sukcesoj kaj ni ne dubas pri tio, ke pluraj grupoj de Esperanto-junularo en Ĉeĥoslovakio trovas multon imitinda, interalie la entuziasmon, motoron de progreso, kiu en malnovaj grupoj ofte mankas kaj estas alternigita per kutimoj kaj nura tradicio:

"La laboro kaj vivo de Moskva Esperantista Junulara Grupo "Fajrero", samkiel laboro de ĉiu ajn junulara grupo, havas kelkajn specifajn ecojn, nome tia grupo ne povas limigi sin je nura "seka" lernado de la lingvo aŭ ties propagando, sed ĝi devas kunigi ĉion ĉi kun elementoj de amuzo, turismo, ripozo ktp. En la prezentata artikolo ni deziras rakonti pri 3 lastaj monatoj, esperante, ke aperontaj resonoj kaj kritikoj helpas al ni en la plua funkciado.

Komunaj celoj, kolektiva laboro proksimigas la homojn. Tial ne estas strange, ke fajreranoj decidiĝis kune pasigi unu el majaj festaj tagoj.

La duan de majo, vespere la junularo kunvenis apud la monumento de M. Gorkij por komenci la promenon en ornamitaj kaj iluminataj stratoj kaj placoj de Moskvo. La Esperantaj parolo kaj kantoj, okulfrapaj, helaj insignoj kun surskribo: "Esperanto" atentigis la moskvanojn dumvoje niaj junaj esperantistoj estis superŝutataj per demandoj: kio estas Esperanto kaj kiamaniere povas ĝin ellerni. Jen Ruĝa Placo, kantado kaj dancoj ĝojplenaj vizaĝoj - ĉio al ni rememorigas la neforgeseblajn tagojn de la VI-a Festivalo! Fino de la proneno estis ŝipveturo sur Moskva-rivero.

La dekan de majo la grupo organizis vesperfeston, al kiu estis invititaj ankaŭ malnovaj esperantistoj kaj gejunuloj interesiĝantaj pri la lingvo internacia. En kluba halo de unu el Moskvaj institutoj kunvenis pli ol 250 homoj. En komenco de la amuzvespero okazis koncerto preparita de dramrondeto de la grupo. Programon de la koncerto konsistigis muziko, deklamo, kantado, sed plej varme la rigardantaro akceptis teatraĵon de F. Silagyi "La grava kunsido" kaj serion de scenejigitaj anekdotoj - miniaturoj, kiuj estis luditaj tre unu post alia kun intermitaj rideksplodoj de ĉeestantoj. Post la koncerto en salono de la klubo komenciĝis ludoj, loterio, demand-konkurso kaj dancoj. Nur en malfrua nokto partoprenantoj de la festo disiĝis, kantante himnon de la demokrata junularo.

Daŭrigante la konstantiĝintan tradicion la grupo entreprenis kelke da renkontiĝojn kun alilandaj gastoj.

Studento el GDR Emil Rechziegber rakontis de pri vivo de germana junularo. Angla turisto F. Willan informis nin pri siaj impresoj el vojaĝo per aŭtobuso de Londono ĝis Moskvo. Tre interesa estis renkontiĝo kun sveda laboristo E. Johanssen, okazinta en Domo, kiu apartenas al Unio de societoj de Amikeco kun eksteraj landoj. Ĉe adiaŭo E. Johanssen skribis en memoran libron por gastoj de la grupo: "Vizitinte Moskvon en julio 1958 mi konstatas, ke la Esperanto-movado vikle vivas en Sovetunio. Mi deziras al ĝi sukceson..."

La membroj de la grupo renkontis ankaŭ sovetajn esperantistojn el aliaj urboj. Ekzemple doktoro G. G. Sevak, loĝanto de Erevano, vizitinte Moskvon voĉlegis siajn majstre verkitajn tradukaĵojn el armena poezio.

La grupo ne ĉesigis korespondadon kun alilandaj kaj sovetaj esperantistoj. Precipe multe da leteroj alvenis el landoj de popola demokratio. Al la tago de Soveta Junularo (29.6.) la grupo ricevis gratulojn el Ĉeĥoslovakio, Hungarlando, Bulgario kaj aliaj landoj...

Ni konstatis, ke multaj, eĉ aktivaj fajreranoj, nesufiĉe bone scias Esperanton... Por forigi ĉi tiun obstaklon, grupestaro decidigis agi tiamaniere, ke la membroj povu dum la somero ekposedi praktika la lingvon kaj ekde la alvenonta aŭtuno la tuta laboro estu farata en lingvo Esperanto. Por ĉi celo en la grupo estis organizitaj konversaciaj rondetoj gvidataj de spertaj junaj esperantistoj. La rondetoj konsistantaj el 7 - 10 personoj vizitadis muzeojn, parkojn, ekspoziciojn, promenis en

stratoj ekzercante sin en parolo. Tia metado tre akcelis al rapida asimilo de la gramatiko kaj al pliriĉigo de vortprovizo. Por la sama celo la grupo decidiĝis fondi esperantistan tendaron, kies partoprenantaj povas baldaŭ akiri fluan parolkapablon.

La tendaro estis instalita 20 km for de Moskvo en pitoreska arbaro apud malgranda lageto. En la unua periodo de la 5-a ĝis 15-a de julio en la tendaron alvenis 16 personoj. Ni loĝis en tendoj, matene lernis lingvon kaj post tagmanĝo promenis, banis nin, ludis, falĉis la herbon kaj vespere ĉiuj kunvenis ĉirkaŭ tendara fajro. En aŭgusto tie estos nova grupo de tendumantoj, al kiuj probable aliĝos ankaŭ junaj esperantistoj el aliaj urboj.

La aŭtuno alvenos. En Moskvon revenos multaj fajreranoj, dume ripozantaj aŭ laborantaj en aliaj lokoj. Ni denove komencos kun freŝaj fortoj la laboron por disvastigo de la lingvo de paco kaj amikeco - Esperanto.

La 30-an de julio.

M. Gišpling  
Prezidanto de la grupo Fajrero.

### JUNULARA ESPERANTO-GRUPO EN SOFIO.

La Junulara Esperanto-Grupo ĉe la tuturba Esperanto-societo "M.Gorkij" en Sofio komencis vivi kiel aparta grupo de post septembro 1957. Tiudate okazis la unua organiza kunveno de la grupo, estis elektita trimembra estraro.

La taskoj, kiujn la novelektita estraro de la grupo starigis antaŭ si estas en ĝeneralaj trajtoj jenaj:

1. Unuigi la gejunulojn - esperantistojn en Sofio, membrigi kaj devigi ilin vizitadi la junularajn en ĉiusemajnajn kunvenojn.
2. Vastigi Esperanton inter gejunuloj, helpi la eatraron de la societo "M.Gorkij" organizi novajn kursojn por junularo kaj studentoj.
3. Klerigi ilin tiel, ke la membroj de la grupo estigi bonaj kaj perfektaj esperantistoj.

La grupo nun konsistas el pli ol 60 anoj, sed la nombro pli kaj pli kreskas.

La grupo kunvenas ĉiusemabate vespere en sia klubejo. Ĝi ellaboras kaj aprobas trimonatajn planojn de la kunvenoj. Ordinare la kunvenoj konsistas el tri programeroj: Unue estas prelego aŭ raporto, due lingvaj demandoj, ellerno de kantoj, humoraĵoj, informoj el la tuta mondo, kaj trie - diversaj sciigoj. La prelegantoj estas precipe gejunuloj. Ĉiu junulo almenaŭ unufoje ĉiutrimonate prelegas aŭ raportas en la kunveno. Kelkiam prelegas spertaj malnovaj esperantistoj el la societo "M. Gorkij", ekz.: "Kiel akiri bonan Esperanto-stilon", "Kiel bone traduki" ktp. Post ĉiu kunveno okazas kolektivaj ludoj kaj dancoj.

Dum tiu ĉi jaro la JEG sukcesis organizi unu elementan kurson por gelernantoj, tri por studentoj kaj unu perfektigan kurson por studentoj. Dank' al bona organizado kaj zorgo de la grupanoj, ĉiuj kursoj finiĝis sukcesplene. La grupo planas organizi en aŭtuno novajn ses kursojn por junularo.

La JEG havas korespondan kontakton kun multaj junularaj societoj en la tuta mondo. La grupo ofte aranĝas kolektivajn vizitojn de filmoj, teatraĵoj, operoj kaj organizas ekskursojn ĝis la proksima Vitoŝa-montaro.

Nun ni starrigas antaŭ ni sufiĉe gravajn taskojn por pli larĝa disvastigo de Esperanto inter la gejunuloj en Sofio.

La estraro.

Nia adreso

Junulara Esperanto-Grupo, p.k.44, Sofio, Bulgario.

## Mi estis en Varna

Mi estis, sed ne dum la kongreso. Unu semajnon poste kaj ankoraŭ mi trovis tiom da interesaj postsignoj. La urbo estis plena de grandaj afiŝoj, eble sur ĉiu arbo estis folieto kun programo de la kongreso en Esperanto kaj en la bulgara. Laŭdire ĉeestis 1400 esperantistoj, da eksterlandanoj estis pli ol 300, rakontis al mi unu maljuna bonkora bulgaro. Ho, gloraj tagoj! La trafiko de la ĉefa strato estis rompita, kiam unu el la stratoj estis nomigata laŭ D-ro L.L. Zamenhof, tiom da homoj. La grandan, ornamitan bildon de Zamenhof mi ankoraŭ vidis en la koncerna strato.

En Varna eble ekzistas neniu, kiu ne komprenus grandan signifon de Esperanto. Kaj mi devas diri, ke varnanoj fieras pri tio, ke en ilia urbo tiom bolas esperantista vivo. Se vi konfesas, ke vi estas esperantisto, ili rigardas vin kun respekto kaj kelkaj ne forgesas aldoni, ke en ilia familio estas ankaŭ esperantisto, aŭ ke la amiko scias Esperanton.

Bulgaraj esperantistoj laboras en tute aliaj kondiĉoj ol ni. La ŝtato tie subtenas la movadon, subvencias eldonadon kaj disvastigon de gazetaro. Bulgaroj havas ankaŭ sian centron, kiu laboras kaj organizas la tutan esperantistan movadon en la lando.

Kiam oni veturas el Varna al Zlaté Písky (Oraj Sabloj), konduktoro eldiras vorton "Esperanto". Kompreneble mi estis surprizita. Estis al mi respondite, ke unu el la plej grandaj aŭtobuso-stacioj estis tie nomigita laŭ la internacia lingvo. Tio, ke veninte en restoracion kaj trovante tablon rezervitan nur por esperantistaj gastoj, signitan per Esperanta flagego, vin poste jam ne povas tiom surprizi. Mi estis feliĉa. Kun miaj korespondantoj mi konatiĝis persone kaj krome mi ekkonis multajn novajn samideanojn. Je ĉarmaj tagoj en Varna mi neniam forgesos.

Zd. Křimský (ĉerpita el la letero).

## EL LETEROJ DE NIAJ AMIKOJ

Al s-ano M. Gišpling (Fajrero) kaj al ĉiuj subskribintoj ni dankas por la salutkarto el Esperanto-Tendaro apud Moskvo.- Laŭ subskriboj de samideanoj el Sarajevo kaj Kopenhago ni konkludas, ke vi havis internacian medion.

Al s-ano Andor Laczkó el Esztergomtábor (Hungarlando) ni dankas por tre bela kaj kortuŝa artikolo "Miaj rememoroj...", en kiu li revenas al SET-57 en Koněšín. Jen kelkaj vortoj el ĝi: ...unuan fojon mi havis honoron vivi inter la ĉeĥoslovakaj gesamideanoj... Precipe plaĉis al mi, kiam mi ekkonis la historiajn interesaĵojn de kelkaj ĉeĥoslovakaj urboj, kaj kiam miaj geamikoj interparolis pri la interesaj kaj belegaj popolfabeloj. Multe ni interparolis pri la poetoj, verkistoj k.a. Kune ni ĝojis, kiam ni sukcesis ekkoni malgrandan parton el literaturo de la du nacioj. Eĉ nun mi volonte rememoras pri la belegaj vesperoj, kiam mi unuan fojon aŭdis la belegajn kantojn de la ĉeĥoslovaka popolo...

...Bone mi rememoras pri la lastaj manpremoj kun la instruistoj kaj la partoprenintoj. Lastan fojon ni deziris al ni bonan feliĉon por la venonto, lastan fojon ni ĉirkaŭbrakis unu la alian kaj poste mi devis iri for, for, for al mia lando. Sonis la komunaj salutvortoj: "Ĝis revido", "Feliĉan vojaĝon!"

Apud Jihlavka mutiĝis la kanto. La karaj gastoj forlasis la bordon de Jihlavka, forlasis la montojn, forlasis la lokon, kie ili travivis neforgeseblajn tagojn.

Nun, post jaro, mi rememoras. Antaŭ ni estas fotografiaĵoj, kiuj denove recitas la pasinton. Mi rigardas ilin rememorante je Jenda, Theodor Kilian, Ehtner Vuk, Ĉenda, Hanička, Blanička kaj la ceteraj. Pasis jaro kaj denove oni faros novajn tendarojn en la plej belegaj partoj de Ĉeĥoslovakio... Mi deziras, ke novaj tendaranoj havu ankaŭ tiel belegajn travivaĵojn kiel ni. Finfine mi salutas la gvidantaron de la Rondo en Třebíč, kiu antaŭ jaro akceptis min. Mi deziras bonan laboron al Theodor Kilian, al la grupanoj. - - -

RIM.: S-ano Laczko estis nunjare unu el la organizantoj de la hungara SET. Sed tiu laŭ lasta sciigo ne okazis.



El la redakcio de BULTENO GEPATRA en Münster (Germ.) oni skribas al ni: Kun ĝojo kaj anlaŭdo mi konstatis la aperigon de tre bone redaktita porinfana paĝo en n-ro 38 de Tagiĝo. Raporteton pri tio vi trovos en nia n-ro 58/3, kie mi menciis ĝin esperante, ke samamaniere vi daŭrigos. Bedaŭrinde la dua Lekanteto en n-ro 39 absolute ne repondas al postulo de "porinfana" paĝo... Certe vi farus pli bonan servon kaj al gepatroj kaj al infanoj, se vi daŭrigus kiel vi komencis. Eĉ se vi rimarkus negrandan aŭ tute neniun ehon, kredu, ke via agado tamen efikas kaj almenaŭ instigas gepatrojn utiligi la materialon, tiel helpante kreskigi la aron de indiĝenaj esperantistoj...

RIM.: Por via bondeziro kaj ankaŭ por la kritiko ni dankas. Vi pravas, sed ne helpas. Eĉ unu letero de iu infano aŭ de gepatroj ne venis. Konvena originala materialo tute mankas, same kiel la spertoj. Se Tagiĝo aperados venontan jaron, espereble "Lekanteto" kontentigos kaj la infanojn kaj la gepatrojn.

Red.

### KONVERTIĜO

Mi volis travivi miraklon,  
jes, ian okultan spektaklon,  
se eble, do pruvon kelkoblan;  
nur tio konvinkus min, sobran.

Amego! Amego! Miraklo!  
Malofta okulta spektaklo!  
Metante eĉ pruvon sennombran  
vi nepre konvinkis min, sobran.

Eli Urbanová

### LIBERTEMPO en JUGOSLAVIO

Se vi ŝatas turismon kaj se vi volas veturi eksterlanden, vizitu Jugoslavion. Helpe de Ĉedok vi dum 18 tagoj traveturos 2500 km en Jugoslavio kaj vi opinios, ke vi krom Jugoslavio vidis ankaŭ Turkujon, Italujon kaj Aŭstrujon. La turkan karakteron havas ekzemple Sarajevo, la italan Dubrovnik kaj la aŭstrian la norda parto de Jugoslavio.

Ĉiuj certe scias, ke Jugoslavio konsistas el 6 respublikoj. Se ni ilin komparas kun Slovakio, ni povas diri, ke ili havas pli grandan memstarecon. Komunaj estas nur 5 ministerioj, ekzemple la ministerio por eksterlandaj aferoj, ministerio de militaj aferoj kaj aliaj.

La ĉefurbo Beograd estas moderna, transporton en la urbo solvas trolejbusoj, sur la stratoj veturas okcidentaj kaj italaj aŭtomobiloj fabrikitaj en Jugoslavio. Domoj nokte aspektas kvazaŭ dum tago, ĉar elektraj briltuboj estas sub domkornicoj. La riveroj Danubo kaj Sáva donas al la urbo evidentan belecon.

Veturante trans la montaron direkte al Sarajevo kaj Dubrovnik ni vidis, ke montaroj estas pli grandaj ol la niaj en Slovakio. Tie ni havas montar-zonojn (Malgranda Fatra, Malaltaj kaj Altaj Tatroj ktp.), sed en Jugoslavio estas montaraj dismetitaj aree.

Sarajevo estas urbo de plej grandaj kontrastoj. Domoj en orienta stilo staras apud modernaj okcidentaj konstruaĵoj. En la urbo ni trovas katolikajn, protestantajn kaj ortodoksajn preĝejojn apud tre multe da mahometanaj moskeoj. Sesfoje dum la tago kunvokas muslimano de sur la minareto kredantojn al la preĝado, muslimanaj pastroj portas sur la kapo blankan turbanon kaj muslimanoj, kiu estis en Mekka, flavan turbanon. Kredantoj, kiuj iras moskeon, devas lavi sian vizaĝon, manojn kaj **xxx** mojn, kiuj timas malvarman akvon, povas uzi akvon varman. Kiel memorindaĵon el Sarajevo eksterlandanoj aĉetadas kupran, latunan aŭ arĝentan teleron **xx** lajn metiaĵojn, ĉar en la tuta Eŭropo estas Sarajevo konata per tiuj ĉi metiistaj fabrikaĵoj.

Vizitinte urbon Dubrovnik homo ne scias unuan momenton, ĉu oni estas en Jugoslavio aŭ en la itala Venecio. La impreson kaŭzas mallarĝaj stratoj kaj palmoj. Nur akvo en stratoj mankas. En

pasinteco la urbo estis longe memstara. Interesa estis regado en la urbo. Homoj moralaj, kiuj semĉese frekvenis tiamajn lernejojn, povis esti anoj de mal-supra senato. La plej bonaj el la malsupra senato post sia 45-a jaro povis esti elektitaj en supran senaton. La plej bona el la supra senato post atingo de la 50-a jaro povis esti elektita kiel prezidanto de la senato. La prezidanto estis ĉiam elektata nur por unu monato kaj dum tiu monato li ne darfis paroli kun sia edzino, familianoj kaj kun kiu ajn alia. Li ordonadis el sia soleco.

Homoj el la regiono sude de Dubrovnik vizitante la urbon alvenas en popolkostumoj. Tuj vi povas distingi fraŭlinon disde sinjorino, ĉar fraŭlinoj portas sur kapo ruĝan ĉapeleton kaj edzinitaj virinoj blankan tukon.

Impreson de Aŭstrujo mi havis en norda parto de Jugoslavio. Kaŭzas tion "Julské Alpy" kaj "Karpíšské Alpy". Antaŭ tiuj ĉi montaroj situas bela lago Bled, karakteriza per preĝejo meze de la lago.

Ĉar mi traveturis dum la libertempo en Jugoslavio 2500 km, ne estas eble priskribi ĉiujn novajn impresojn. Fine ankoraŭ kelkaj vortoj pri Esperanto, kies movado en Jugoslavio estas pli forta ol ĉe ni. Esperanto estas jam devige instruata en 42 lernejoj kaj en la lando estas oficiale eldonataj 4 gazetoj. Ni deziru, ke ankaŭ ĉe ni estu baldaŭ eldonata oficiale Esperanta gazeto, kaj ke Esperanto estu elsendata el niaj radiostacioj.

Ondřej Macura

RIM.: Sur apuda paĝo estas skizo el Sarajevo: Horloĝa Turo, kiu montras la saman tempon kiel en Turkujo kaj fontano de Begova Moskeo.

#### UNUA ESPERANTISTA LABOR-BRIGADO EN SLAVONIO

27.7.1958 kolektiĝis junaj esperantistoj el tuta Jugoslavio por krei unumonatan laborbrigadon por konstruado de kanalo kaj aŭtomobilvojo ĉe Cerknica lago. La brigado plenumis ĉiutagan normon je 140 % kaj krom 7 perfektigis pri kaj en Esperanto. Pri la brigado parolis 4.9. sep partoprenintoj en Radio Zagreb.

#### KONKURSO DE TAGIĜO

Fine mi fermas la konkurson de Tagiĝo. Unu jaron ĝi daŭris. Konvenas resumi kaj aprezi la rezultojn, sed mi sentas embarason. La konkurso ne kontentigis min. Ĝia resonado estis post ĉiu nova numero mulpli kaj ĝojiga. La lastajn du taskojn sendis nur 4 (kvar!) legantoj. Pardonu, sed mi ne donos komenton pri tiu ĉi neglora finalo.

En la konkurso entute partoprenis 31 gesamideanoj. Kolektiĝis pluraj eminentaj kontribuantoj, sed ofte tiaj estis unusola tasko plenumita. Nur kelkaj unuopuloj partoprenis regule. Specialan laŭdon meritas nur la unuaj kvar. Ĉagrenas min, ke la konkurso ne populariĝis. Denove eblas kritiki laboron de la grupoj kaj de ties estraro. Tagiĝo ja ne estas afero nur de la eldonanto kaj la redaktoro!

Premiotaj estas la unuaj dek. Bedaŭrinde paketo kun la premio-libroj (Faraono, Quo vadis, Sinjoro Tadeo k.a.), kvankam el Opava letere anoncita, ankoraŭ ne venis. La premioj estas dissendotaj tuj post ilia alveno.

La plej sukcesaj konkursantoj:

1. Vladimír Novotný (Praha - D-kategorio - 55 poentoj).
2. Marie Bohunová (Nová Paka - D-kategorio - 54 poentoj).
3. Jiřina Kohoušková (Opava - B-kategorio - 40 poentoj).
4. Zdenka Rejlová (Třebíč - C-kategorio - 31 poentoj).
5. František Maděryč (Havířov - C-kategorio - 21,5 p.).
6. Ing. J. Lecian (Ostrava - C-kategorio - 18 poentoj).
7. Magda Matušková (Frýdek - D-kategorio - 17,5 poent.).
8. Oldřich Schwetter (Havířov - D-kategorio - 17 p.).
9. Božena Schwettrová (Havířov - B-kategorio - 17 p.).
- 10.† Libuše Jonášová (Ústí n/Lab.- C-kategorio - 15,5 p.).

Plej alta nombro de poentoj atingeblaj estis 60. En ĉiu lingva kategorio estis la taskoj aparte aprezataj, la fina sinsekvo estas farita laŭ atingitaj poentoj sen apartigo de la kategorioj.

Al Vlád'a Novotný, al lia konkursa "ombro" Marie Bohunová kaj al ĉiuj, kiuj partoprenis en la konkurso kaj batalis konsciencie laŭ siaj kapabloj, mi sincere gratulas.

Jan Werner

## La flago de ĉampionoj

Konkurso de TAGIĜO - tasko 5-a.

Mi elektis parton el romano de František Kožík: Vlajka vítězů (La flago de ĉampionoj), kiu min iam ravis pro tio, ke ĝi montras veran kamaradecon, kuraĝon de junaĝo, honorecon. Mi pensas, ke ĝi estas bona eduka romano por junularo.

Vladimír Novotný

Tradukita fragmento:

"Kia estas nun la stato?" demandas ĉeĥoslovakoj.

"Italoj havas entute 146 poentojn, ni 139. Tonda devus akiri almenaŭ ok poentojn. Sed li faros nulon."

Herben demandeme rigardas Tonĉjon, ĉu li volas tion provi. Tonĉjo iras kvazaŭ senkonscia. Li ne scias, kio okazas kun li. Li provadis tion; li scias, ke li povos sin plu teni. Sed li irus kiel maŝino, **xxxxx** pli forta lin gvidus.

Kiam li staras ĉe la grimpsnuro, renkontiĝas lia rigardo - nedecidema kaj demanda - kun rigardo de la teamgvidanto. Kaj Vandas diras nur tri vortojn:

"Faru, kion vi povas!"

Ĉiuj gimnastoj plejvolonte turnus sin, por ke ili ne vidu dolorplenan vizaĝon de Tonda, kian li tuŝos la ŝnuron kaj kiam la spasma malebligis al li grimpi.

Ordonu. Nun!

Tiun momenton la ĉeĥoslovakaj konkurantoj neniam forgesos. Eĉ Herben ne, maljuna trejnisto kaj sperta gimnasto, neniu el tiuj, kiuj scias, ĝis kien iras homa sinrego.

Jes. La doloro tordis la vizaĝon de Tonĉjo, sed liaj manoj ne defalis de la ŝnuro. Li grimpas, supreniĝas, pli kaj pli alten, konstante rapidiĝas, liaj brakoj vetflugas, estas videble, kiel li ĉiam helpas al si per la maldekstra, por ke li faciligu al la dekstra.

"Li atingos! Atingos!" flustras al si Herben.

Jam estas supre! La manplato frapas la kontrolan sonorilon. Sed kio okazas? Li grimpas plu kiel sen konscia – bato!

Tonĉjo per la kapo batis sin je traverso.

Ĉiuj elkrias kaj la tuta skipo kuras al la ŝnuro. La sekundo de teruro. Ĉu li tenos sin aŭ defalos?

Ankoraŭ momentu, kaj poste Tonĉjo malrapide malsupreniĝas. Li ĉesas sin teni per la dekstra mano, malsupreniĝas nur helpe de la maldekstra - kaj desaltas kaj falas en la brakojn de siaj kamaradoj.

Juĝanto sciigas la tempon. Rekalkulite: dek poentoj!

## LINGVA ANGULETO

Antaŭ tempo mi ricevis maŝinskribitan trifolian cirkuleron "Revuo de revuoj", kiu traktas nur la lingvajn aferojn en Esperanto. La enhavo estas plejparte ĉerpita el diversaj Esperantaj gazetoj. Aŭtoro de la cirkulero, aŭ pli bone dirite kompilinto, celas al pura, Fundamenta Esperanto. Por montri danĝeron en tro modernaj lingvaj formoj kaj neologismoj li elmetas en la cirkulero interesan materialon.

El la februara n-ro de "Paris Esperanto" estas represite:

"Tre ofte, kiam mi provas legi kiujn ajn nuntempajn poemojn, mi tute ne retrovas la Zamenhofan facilecon. Veraj rebusoj ili estas, unue pro la troa dislokado de la diversaj frazeroj, kaj due pro la multeco de radikoj, kiujn vi ne trovas eĉ en la plej freŝe presita vortaro..."

El la maja-junia n-ro de "Les Cahiers de Grésillon" estas prenita artikolo de D-ro André Albaut, kiu skribas interalie:

"Verbigado de adjektivoj estas kondamninda peko malbeliganta kaj kripliganta la modelan Zamenhofan verkon... Oni sisteme enkondukas eĉ pure personajn kapricaĵojn: "NE JAM" anstataŭ "ANKORAŬ NE". Anstataŭ malmultekosta oni ofte presigas "malkara", anstataŭ APUD oni presigas "ĈE". Anstataŭ aplikadi la finaĵon de la akuzativo oni aplikas la prepozicion de la dativo. Oni ekzemple ankaŭ neniam veturas en Berlinon, sed oni ĉiam veturas nur AL Berlino, ne enirante la urbegon, sed haltante nur ĉiam sur ĝia limo..."

Plu skribas ŝajne kompilinto de la cirkulero:

"Emmerson diris: "Tio, kio estas simpla, estas granda. Mi aldonas: Tio, kio estas simplega, estas des pli granda. Estas ja konate, ke se Esperanto ne restus lingvo facila por ĝin ellerni, ĝi perdus sian (raison d'etre) - ekzistkialon!

Nerefutebla fakto estas, ke Esperanto, de post la apero de la Suplemento de la Plena Vortaro de Esperanto 1954, estas senhalte, sisteme dialektigata, fuŝigata, kaĉigata., komplikigata, kripligata, malfaciligata, mortigata, slangigata. Por kies sekretaj interesoj? Ĉu la fuŝigantoj estas blindaj kaj surdaj?, ke ili nenion scias pri la protestoj kontraŭ tiu ĉi procedo? ..."

Tiu ĉi forta kritiko koncernas ankaŭ la mal-vortojn, ekz.: dura (malmola), kurta (mallonga), olda (maljuna), lanta (malrapida), trista (malĝoja) ktp.

En la novembra TAGIĜO ni provos objekte skizi la aktualan ardan problemon de neologismoj kaj novaj formoj en Esperanto. Bonvolu ankaŭ vi kontribui per via opinio. La materialon sendu al la redakcio.

J. Werner

## PRINCIPOJ DE VORTA ELEKTO KAJ FORMIGO. [FAKLINGVOJ]

Malgraŭ la prospera evoluo de Esperanto ties faklingvoj restis plejparte nuraj projektoj. Tamen estas konate, ke nur la praktikado ebligas teni bonan nivelon, registri novajn esprimojn, evoluigi la fakan lingvon al la plej alta perfekteco. Nia faka literaturo estas bedaŭrinde malriĉa, en certaj branĉoj tute ne ekzistas, terminaroj de multaj fakoj fariĝis kolektoj de arkaismoj. Jen, ĝi estas fekunda kampo por ĉiu iom instruita esperantisto. Praktiki, tio signifas legi, korespondi kun kolegoj, studi kaj diskuti. Bonaj fakuloj povas traduki kaj verki originale. Por faciligi al vi trovon de ĝusta starpunkto en lingvaj problemoj, mi resumas ĉiujn gravajn principojn de vorta elekto. Same kiel en la lingvo ĝenerala, ankaŭ en la faka povas ekzisti balastoj - nekonvenaj vortoj, homonimoj, rompita reguleco k.a. Ni agu! Ni forĝu nian Esperanton ĉiam kun plena konscienco.

### 1. Principo de vortara ekonomio.

Laŭ modelo de naciaj lingvoj apliki vortojn jam ekzistantajn, sed kun alia, speciala senco. Elektante tian esprimon estas necese atenti la nacilingvan uzadon de similaj esprimoj. Paul Neergaard en "Atakoj kontraŭ ĝardenplantoj" uzis: l u k t i - en la senco kontraŭagi damaĝajn faktorojn, k a n c e r o - certa kategorio de plantmalsanoj, m a s t r o - (planto) – portanto-suferanto de (ataka) organismo ktp.

### 2. Principo de internacieco.

Latinismaj terminoj aŭ alidevenaj terminoj internacie uzataj estas esperantigataj, ĉar la fakula publiko povas facile transpreni la Esperantan, internacie konatan, terminaron. Ĝi estas apliko de la 15-a regulo de la Fundamenta gramatiko.

Por laika publiko ne konvenas la scienca terminaro, tamen ĝi bezonas kelkajn tre gravajn terminojn. Ofte taŭgas formoj derivitaj el jam konataj vortoradikoj. Novaj radikoj estas balasto.

Scienca: teliosporo, uredosporo, toksikozo, melolonto ...

Populara: vintrosporo, somersporo, venenozo, majskarabo ...

Se la formo varias en naciaj lingvo, oni devas serĉi vorton, kiu respondas al optimuma internacieco. Tio signifas, ke ne sufiĉas taksi gravecon de la lingvo laŭ la nombro de ties uzantoj, sed ankaŭ laŭ la rolo, kiun la lingvo ludas en la koncerna fako.

### 3. Principo de laŭreguleco.

Tiu ĉi principo akcentas unuformecon de vortoformoj transprenataj el lingvoj naciaj kaj ankaŭ el internaciaj terminoj latinaj. Paul Neergaard uzas ekzemple nomojn de plant-malsanoj kun la sufikso – o z o , kvankam en lingvoj naciaj tia analogieco mankas: arĝentfoliozo, fotozo, klorozo, mikoza, termozo; toksikozo, velkazo ktp.

### 4. Principo de vorta ekonomio.

Analogion ni trovas kun la principo de sufiĉo kaj neceso laŭ René de Saussure en ĝenerala Esperanto: ne uzadi superflujajn vortelementojn, ekz. sufiksojn. Krome estas ankaŭ ebla ellaso de radikparto sub influo de internacieco: virozo anstataŭ virusozo.

### 5. Principo de bonsoneco kaj prononca klareco.

Ĉiam antaŭ elekto de nova formo valoras esplori la elparolkutimojn bazitajn sur tradicio de la naciaj lingvoj kaj prononceblon el flanko de niaj parolorganoj. Precipe temas pri tikla afero de "s" kaj "z", de "d" kaj "t", de troa ĝ, ĉ kaj konsonantoj entute.

J. Werner

Fonto: Paul Neergaard: "Rimarkoj pri kelkaj terminologiaj principoj" en Scienca Revuo Vol.8-a, n-ro 2-a.

La temo pritraktita konformas kun la 3-a demando de la junulara D-ekzameno el gramatiko.

## Sub mia fenestro

Franca popola kanto. La Esperanta kaj ĉeĥa traduko de Josef Cink.

- |     |  |   |
|-----|--|---|
| 1.  | Sub mia fenestro<br>najtingala kant'<br>sonas tutan nokton<br>por mi – maldormant' | Pod našim okénkem<br>zpívá slavík mi,<br>celou noc mne těší<br>svými písněmi.     |
| Rf. | La kanto birdeta<br>ne koncernas min,<br>estas ĝi por mia<br>fora amatin'          | Když zpívá, ať zpívá,<br>ale pro mne ne,<br>jeho píseň leť k mé<br>milé vzdálené. |
| 2.  | Post montoj altegaj<br>ĝis la firmament'<br>kaŝas sin de mia<br>amatin' tegment'.  | Ó hory vysoké,<br>proč tak hrdé jste,<br>spatřít milé domek<br>Proč mi bráníte?   |
| 3.  | Montaroj, kliniĝu,<br>levu vin, eben',<br>por ke domon karan<br>vidu mi sen ĝen'.  | Vy hrdá pohoří,<br>skloňte hlavu svou,<br>ať mé oči známou<br>Střechu zahlédnou.  |

4. Kompletez montaroj  
 vere klinis sin,  
 lasis mian vidon  
 al la amatin'.

A milá pohoří  
 hlavu sklonila,  
 doletěl můj zrak tam,  
 Kde je má milá.

*Lent et contemplatif*

Des - sous ma fe - nê - tre, Ya un oi - se - let: Tou - te la nuit  
 chan - te un air nou - ve - let. S'il chan - te, qu'il chan - te, Ce n'est  
 pas pour moi, Mais c'est pour ma mi - e, Qui est loin de moi.

## Enigma konkurso


Solvo de ŜANGUMOJ el la pasinta numero:

1. doloro - koloro; 2. ledó - lado; 3. lunon - lumon 4. forta bato - for tabano.

Pro malfrua apero de la n-ro 40-a ne esti eble ĝustatempe sendi la solvojn. Tamen ni notas ioman eĥon. Ekz.: s. Miloš Rybín krom la ĝustaj solvoj aldonis kelkajn proprajn ŝanĝumojn. Jen unu el ili:


Laŭdata ago, kiu donas al ni panon, -o-----  
 kvalita kreskaĵ' ebligas la fumadon. -o-----

La enigmo, kiun ni hodiaŭ ellernos, estas ĈEVALIRO. Kiu ludas ŝakon scias, kiel "saltas" ĉeval-figuro. Jen la ebloj, kiujn havas la ĉevalo en la ŝako por sia iro. Simile oni kunmetas silabojn en la enigmo nomata "ĉevaliro": (vidu la apudan skizon)



Faciligo dum la solvado estas, ke la linioj, per kiuj ni ligas la silabojn ĉe la sekreta teksto, devas esti simetriaj. Ekzemplo.

Solvo:  
 Ellernu perfekte  
 Esperanton.



Se ni do kunligos kelkajn silabojn en la vortojn ĉe unu flanko de la silabaro, ni povas tuj fari la simetriajn liniojn ĉe la dua flanko.

Ĉ E V A L I R O

				ME			JAM						
POST	DO	LA	BROJ	HAL	ĜI	DA	RO	EN	CO	TA	RE		
DI	MEM	TOS	TE	MA	ZU	NE	SUR	GRAN	LA	NUU	KAJ		
DO	MUL	VERS	DE	DE	JO	HO	BU	TE	BA	CI	LA		
KO	DO	LAJ	ĜA	ĜIN	RO	MA	PLI	RE	DO	MU	FO		
TAJ	FRA	TE	CI	RO	LA	LOW	KAJ	KO	NU	KA	PRO		
ĜA	MEU	DO	JA	NI	CI	EN	DA	KOM	CI	JON	DA		
KAJ	MIL	TI	FAK	ĜAS	ROJ	DRE	MEU	U	SUR	KA	PRO		

(de J. Kuzník) Fragmento el fame konata parolado de Dro L.L.Zamenhof en unu kongreso. Via tasko estas ne nur solvi pri kia teksto temas, sed ankaŭ el kiu kongreso la parolado estas, kie kaj kiam ĝi okazis. Unu bona solvinto estas premiota! La solvojn sendu ĝis 31.10.

## Esperanto en lernejoj

Redaktas O. Schwetter, Havířov I. - 14/67, ĈSR.

Jam la trian fojon mi entreprenis Internacian Sportkonkurson de Esperantistaj Lernejoj, kiu okazis dum la Internacia Tago de Infanoj, la 1-an de de junio 1958.

Ĉijara ISEL partoprenis 6 lernejoj el 4 ŝtatoj (Anglio, Ĉeĥoslovakio, GDR, Sovetunio). La sportkonkurso estis organizita tiel, ke unue oni entreprenis antaŭfinalon kaj poste finalon. Dum la antaŭfinalo vetbatalis 178 gelernantoj kaj en la finalo 42 gelernantoj (19 knabinoj, 23 knaboj).

Rezultoj de la knabinaj skipoj:

- |   |          |
|---|----------|
| 1. Mittelschule Kötzschenbroda, RADEBEUL, GDR .....       | 933 po.  |
| 2. Pestalozzischule, FREITAL, GDR .....                   | 758 po.  |
| 3. Ĉeĥa okjara mezler. De K. Gottwald, D. BLUDOVICE ..... | 664 po.  |
| 4. Pola okjara mezlernejo, D. BLUDOVICE, ĈSR .....        | 522 po.  |
| 5. (10-jara mezlernejo, MINKIVCI, USSR .....              | 516 po.) |

Rezultoj de knabaj skipoj:

- |   |          |
|---|----------|
| 1. Pestalozzischule, FREITAL, GDR .....                   | 765 po.  |
| 2. Temple Boys School, ROCHESTER, Anglio .....            | 755 po.  |
| 3. Mittelschule Kötzschenbroda, RADEBEUL, GDR .....       | 682 po.  |
| 4. Ĉeĥa okjara mezler. De K. Gottwald, D. BLUDOVICE ..... | 673 po.  |
| 5. (10-jara mezlernejo, MINKIVCI, USSR .....              | 519 po.) |

Unuopulinoj:

- |   |         |
|---|---------|
| 1. Schade Margit, Radebeul, GDR .....     | 295 po. |
| 2. Voloŝinjuk Lubov, Minkivci, USSR ..... | 263 po. |
| 3. Jung Renate, Radebeul, GDR .....       | 256 po. |

Unuopuloj:

- |   |         |
|---|---------|
| 1. Strobel Heinz, Freital, GDR .....            | 217 po. |
| 2. Butcher Petr. Rochester, Anglio .....        | 204 po. |
| 3. Nightingale Anthony, Rochester, Anglio ..... | 199 po. |

Nun pri unuopaj lernejoj:

Mittelschule Kötzschenbroda, RADEBEUL 2, Harmoniestrasse, GDR – tiu ĉi lernejo atingis bonegan sukceson, ĉar ĝiaj lernantoj estis la plej bonaj. La lernejo partoprenis ISEL-on la unuan fojon. Vi, lernantoj el tiu ĉi lernejo, akceptu la plej sinceran bondeziron al la venko kaj multe da sukcesoj en venontjara ISEL!

Pestalozzischule, FREITAL 2, GDR – la lernejo estas konata kiel regula partoprenanto de la ISEL. Nunjare ĝi partoprenis jam la trian fojon, kaj atingis sian plej grandan sukceson, ĉar la knaba skipo venkis, la skipo de knabinoj lokiĝis dualoke kaj unuopulinoj lokiĝis unua- kaj tria-loke.

Temple Boys School, ROCHESTER, Kent, Anglio – ankaŭ ĉi tiu lernejo regule partoprenadas la ISEL-on. Ĉar temas nur pri knaba lernejo, ĝi partoprenas nur per knaba skipo. En la jaro 1956 ĝia knaba skipo fariĝis ĉampiono.

10-jara mezlernejo, MINEIVCI, Chmelnická olast, Ukrajina USSR - partoprenis la unuan fojon. Samtempe ĝi estas la unua lernejo el Sovetunio, kiu en la historio de ISEL partoprenis. Bedaŭrinde, ke ĝi sendis rezultojn de nur 3 la plej bonaj knaboj kaj knabinoj. Mi skribis al ili, ke oni tuj sendu la rezultojn de la kvaraj geknaboj, sed ĝi restis sen respondo.

Ĉeĥa okjara mezlernejo kaj pola okjara mezlernejo en DOLNÍ BLUDOVICE, Ĉeĥoslovakio, entreprenis la ISEL-on kune sur la sportejo de Sokol (gimnastika societo en vilaĝoj de Ĉeĥoslovakio).

La III-a ISEL finigis, ek al la IV-a! La ceteraj lernejoj, kie estas kapablaj instruistoj de gimnastiko kaj esperantistaj instruistoj, partoprenu la IV-an ISEL-on. Skribu jam nun pri informoj! Rigardu Tagiĝon, n-rojn 36 kaj 37, kie estas ĉi-jaraj kondiĉoj. Por la IV-a ISEL estos kondiĉoj preskaŭ similaj. (Ne forgesu aldoni respond- kuponon, se eble.)

#### Instruistoj. - esperantistoj, ne dormu!

Komenciĝas nova lernojaroj kaj estas konvena tempo per fondi Esperanto-rondeton en via lernejo. Ne timu kaj agu, neniu senkapigos vin, se vi fondos ekzemple "Pioniran Esperanto-rondeton de junaj pacdefendantoj". Ju pli multe da tiaj rondetoj, des pli bone por nia afero. Plimultigu la vicojn de niaj lernejoj Esperanto-rondetoj.

Mi ankaŭ atentigas je la fakkunsido "Esperanto en lernejoj", kiu okazos en kadro de Interbabilado en Ostrava. Ne preterlasu tiun ĉi eventon!

---

LENINGRADA JUNULARA ESPERANTISTA GRUPO "A Ŭ R O R O" Kirovskij pr. 42, Kulturdomo, Leningrad – 22, USSR.

#### ESTIMATAJ GESAMIDEANOJ!

Nia grupo "Aŭroro" konsistas el junaj geesperantistoj de Leningrado - laboristoj, oficistoj, studentoj, lernantoj, scienculoj, instruistoj, inĝenieroj, kuracistoj, artistoj k.t.p.

Niaj celoj estas?

uzado de internacia lingvo por propagando de la mondpaco, organizo de amikecaj kontaktoj kun junularaj kolektivoj kaj unuopuloj esperantistoj el alilando por fortikigi: reciproke komprenigon inter diversnaciaj gejunuloj; diskonigo de la sukcesoj de Sovet-Unio en la sfero de socipolitika, scienca, kultura kaj sporta vivo disvastigo de la lingvo Esperanto inter la junularo.

Konforme al suprenomitaĵoj celoj ni volonte kunligigoj kun ĉiu esperantista aŭ uzanta Esperanton junulara organizaĵo, kun ĉiuj gejunuloj el la tuta mondo.

Ni alvokas vin pligrandigi la rolon de Esperanto kiel paca unuigilo de la diverslingvaj nacioj.

Kun plej sinceraj bondeziroj ni salutas vialandan junularon je la nomo de leningradaj gejunuloj.

Ni atendas viajn leterojn.

MEMBRARO DE "AŬRORO"

---

ESPERANTO-JUNULARO DE SVISLANDO okazigos SKIFERION en ADELBODEN, 1400 metrojn alta skistacio en la svisaj Alpoj. La skirestadoj en la pasintaj vintroj majstre sukcesis, tial ankaŭ nunjare gastigos hejme ĉaledo (alpa lignodomo) 16- ĝis 30-jarajn gejunulojn. Suma prezo 90 svisaj frankoj. Skikursoj kaj Esperanto-kursoj: 26.12.1958 - 4.1.1959. Adreso: Andrée Gacond, Crêt 78, La Sagne/NE, Svislando.



-----  
NOVA RONDETO en ALTAJ TATROJ: En Nová Polianka VLU, gvidas la kurson por 22 komencantoj s. Fr. Hropko. Aŭtune li volas fondi la rondeton en sia loĝloko Pliešovce apud Zvolen.  
F.S.

### ANONCOJ

#### KORESPONDI DEZIRAS:

M.FEJFAR, Dymokury 268 u Poděbrad, ĈSR - interŝ.il.p. k., p.m., fotografaĵojn - kun ĉiuj landoj.

G.POUP, Dymokury 87 u Poděbrad, 5SR - interŝ.il.p.k., p,m., fotogr. - kun ĉiuj landoj.

PIONIR-DOMO en LANŠKROUN, nám.Rudé armády 56, LSR -serĉas korespondemulojn 12 - 14-jarajn el la tuta mondo por siaj membroj (geknaboj)- esperantistoj.

#### KORESPONDAN KURSON GVIDAS:

František SVAČINA, Lanžhot, ĈSR. Aliĝontoj indiku: Nomon, profesion, aĝon, adreson, laborlokon.

#### ESPERANTAĴOJ:

KANTARETO, eldonita en Frýdek, estas belaspekta, en verda tole bindita kovrilo, A6-formata, kun kantoj originalaj kaj tradukitaj, kun tekstoj kaj muziknotoj. Nepre ĝin mendu por vi kaj ankaŭ por viaj koresp. Prezo: 6 Kĉs. Adresa: Marie Bartovská, MÍSTEK, Slezan n.p.

LA JUNA ESPERANTISTO - duonmonata gazeto por junaj esperantistoj kaj infanoj, eldonata de Haga Esperanto Kunlabor-Komitato, estas el Ĉeĥoslovakio abonebla per novaj Esp.libroj kaj Esp.poŝtmarkoj egalvaloraj al 12 steloj, t.e. 10 int.resp.kup. Adreso de la administrejo: Hoefbladlaan 107, Den Haag, Nederlando.

KNIHA n.p. prodejna 2086, cizojazyčné odd., PRAHA II; Václavské nám. 42. - eldonas kaj senpage dissendas: "Informační služba o knihách v jazyce ESPERANTO" (Informservo pri la libroj en lingvo Esperanto).

ELDONAS: Esperantský odbor Domu osvěty P. Bezruče v Opavě

ADMINISTRAS: Jaroslav Kuzník, U Jakařské brány 8, Opava

Ĉi n-ron ILUSTRIS: K. Škovran, Ing. A. Viktora, Enka

T 27524-8